

BOULOGNE SUR MER
31, BOULEVARD MARIETTE

la 12^{an} de Sept. 1932

Kara amiko.

Senkulpigu min se mi malfrue respondas vian afablan leteron de la 22^a de la pasinta sed ni vojaĝis en Alsace + tra Francujo, automobile de la 12^a de Aug. ĝis la 4^a de Sept. farante 2200 kil. Hejme, mi trovis multajn okupojn + plie dum la lasta semajno, ni ricevis amikojn diversajn ĉiutage aŭ iris ĉe ili.

Nur hodiaŭ mi estas libera + rapidas vin danki por viaj belaj fotoj + ŝatata letero.

Ni ambaŭ bedaŭris ke vi tiel malmulte ĉeestis la Kongreson sed tamen, mi komprenas ke vi deziris vidi Parizon, despli ke via edzino ne parolas Esp. + eble sin sentis malfeliĉa en la Kongreso.

Dum la balo kiu vere estis tre tre bela + plensukcesa, mi serĉis vin ĉie - oni diris al mi ke oni vidis vin + pro tio mi serĉis kompreneble sen sukceso. Tion mi bedaŭris - vi scias bone, ĉu ne?

Pri la juristaj kunvenoj estis vere domaĝe, precipe tiu en la restoracio kien venis tre grava persono: la prez^o de la nacia asocio franca de advokatoj, kiu venis rekte el la internacia Kongreso en la Hago, nur por unu nokto. Li promesis lerni Esp. La tuta festeno estis tre ĝuebla + agrabla.

Ŝajnas ke vi ne estis elreviĝitaj pri Parizo + pri ĝiaj vidindaĵoj. Vi certe vidis pli ol mi vidis aŭ vidos - pri tio mi ĝojas.

Diru al via edzino ke mi ĝojis konatiĝi kun ŝi. Mi esperas ke ŝi + vi ne plu estas lacaj, ke vi bonege fartas + ke baldaŭ vi estos tenisaj geĉampionoj.

Mi premas viajn manojn, de nove dankoj + grandaj bedaŭroj ke mi vidis vin tiel malmulte.

Sinceraj salutoj de ni ambaŭ.

Amike via.

Acie Sergeant